

Nikolaus Lenau,

Ĉiel-malĝojo

tradukita de Manfred Retzlaff

Migradas penso surĉielvizage,
 La morna, griza, peza nubo jen;
 Arbed' envente frenezulmalsagaĝe
 Sin ĵetas tien-renn en ĉagren'.

Eksonas bruo de l' ĉielo kiel
 Malforta ĝemo de melankoli',
 - okul' ploronta ekrigardas tiel, -
 El ĝi ekbrilas febla lumradi'.

De l' marĉo fridaj trem-aeroj vente
 Alblovas supererikeje nun;
 De la ĉielo trista senatente
 Elmane falis la lasita sun'.

*Traduko de la Germana poemo “Himmelstrauer” de NIKOLAUS LENAU (*1802-08-13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-627-1268 (2012-10-26 14:09:29)

Pri la poeto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau.